

Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaudon la 9-an de decembro 2021 je 20.00 per Zoom

Ĉeestis: Bård Hekland, Jardar Eggesbø Abrahamsen, Claude Rouget, Marianne Lund, Lars Sandbakk kaj Vidar Skretting

1) Tagordo

Oni aprobis la tagordon aldonante tri temojn sub *Eventualaĵoj*.

2) Trarigaro de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 7-an de oktobro 2021

Neniu komento.

3) Ekonomio de NEL

Claude la 27-an de novembro skribis retpoŝtan mesaĝon al la estraro pri la ekonomia situacio, atentigante pri du solvendaj demandoj: 1) Ĉu pagi subvencion al NJE? 2) Pligrandigo de la liberaj rimedoj.

- 1) NJE: Vidar raportis, ke NJE momente ne havas funkciantan estraron, tamen la organizo ne estu konsiderata morta, ĉar ĝi aktivis antaŭ la pandemio, ekzemple somere 2019. Indus diskuti tion ĉi pli detale en venonta estrarkunveno. Ni decidis ne doni subvencion al NJE nun, sed pretas doni pli poste, se estos agado.
- 2) NEL ĉiujare perdas iom pli da membrokotizoj, sed danke al la profito de *Skagen-fondene* la ekonomia situacio momente tamen ne estas kriza. Nun preskaŭ la tuta kapitalo estas fiksita en *Skagen-fondene*. Indus havi pli da disponebla mono por povi pagi eventualajn neantaŭvidatajn elspezojn. Eblas transigi tiucele la monon, deponitan ĉe NEL de la bergena klubo, aŭ la monon de la ILEI-konto (ĉar ne plu ekzistas norvega instruista sekcio), ne tuŝante la monon en *Skagen-fondene*, kiu donas plejan profiton. Bård preparolos la bergenan monon kun la plej aktivaj eksklubanoj de Bergeno. Ni esploru, kiu havas disponrajton de la ILEI-konto. Gravus, ke la koncerna mono post eventuala transigo restu videbla en la kalkuloj kiel mono, apartenanta al la bergena klubo aŭ ILEI respektive.

4) Telefona enketo al la membroj

Marianne prezentis temojn kaj eblajn demandojn por telefona membroenketo. Ni decidis, ke ŝi faros kelkajn provintervjuojn kaj raportos pri la rezultoj en la unua kunveno de 2022.

5) Landa kunveno 2022

Ni decidis, ke okazu reta landa kunveno la 4-an kaj 5-an de majo 2022 (merkredon kaj ĵaudon de semajno 18) je 19.00-22.00. Informoj pri la kunveno estu publikigataj en la januara numero de *Norvega Esperantisto*, por ke eventualaj proponoj pri statutŝanĝoj venu al la estraro ĝustatempe por la necesa anticipa pritrakto. Pri la programo ni provizore planas, ke la unua vespero (merkredo) estu diskuta (pri la estonta evoluo de NEL) kaj la dua (ĵaŭdo) – decida (pri formalizaĵoj kaj laborplano). Fizika landa kunveno okazu en 2023.

6) Membroregistrado per Spond

Lars petos de Douglas la membroliston, enmetos la informojn en Spond kaj funkciigos fidindan datumbazon, eventuale kunlabore kun Vidar kaj Douglas. Oni esploru, ĉu eblas eksporti la membroliston el Spond al alia loko.

7) Ekstera informado

Ni diskutis, ĉu ni daŭre produktu *Esperanto-nytt*, aŭ ĉu ni eble anstataŭigu ĝin per io alia. Ni decidis, ke Bård faros almenaŭ la trian ĉi-jaran numeron de *Esperanto-nytt* kaj ke ni ne malfondu ĝin nun. Ni provu uzi la materialon de *Esperanto-nytt* ankaŭ en *Facebook* kaj en la hejmpaĝo. *Esperanto-nytt* povos daŭre utili en informbudoj post la pandemio.

8) Retaj seminarioj

Ni resumis la spertojn de la retaj seminarioj pri TEJO (17-an de aprilo) kaj pri lingvoj en supera edukado (25-an de novembro). Ni opinias, ke ili estis bonkvalitaj kaj sukcesaj kaj ke ili interalie gravas kiel renkontiĝejo por la membroj en la nuna situacio, kiam la membronombro malkreskas kaj pluraj kluboj ne plu funkcias. Ni raportu pri la seminarioj en *Norvega Esperantisto* kaj en la hejmpaĝo.

9) Vortara projekto

Jardar informis, ke la ĉefaj partoj de la vortara laboro principe estas finfaritaj, sed necesas esplori, ĉu la laboro nuntempe troveblas en la koncerna dosiero. Jardar provos organizi kunvenon kun Herman kaj Jørgen jarkomence por klarigi la situacion kaj esplori eblan vojon antaŭen.

10) Esperantonia – la oficejo de NEL

Bård mallonge raportis pri sia vizito al la oficejo la 4-an de novembro, dum kiu li diskutis kun Douglas la estontan utiligon de la oficejo.

11) Retpoŝta servilo

Jardar informis, ke li kaj Judith la 30-an de novembro sukcese movis la retpoŝtan servilon al Domeneshop. Claude konfirmis, ke ĉio nun bone funkcias.

12) Grasrotandelen

Prokrastiĝas.

13) Jarraporto por 2021

Ni decidis, ke Bård disdividu inter la estraranoj la respondecon pri la diversaj partoj de la jarraporto.

14) Eventualaĵoj

- a) Brønnoysundregisteret: La estraro decidis, ke Bård Hekland havu subskribrajton de NEL anstataŭ Mario Machlik. Claude kaj Marianne ordigos tion en Brønnoysundregisteret. **Norsk: Styret vedtok at Bård Hekland heretter skal ha signaturrett for Norsk Esperanto-forbund i stedet for Mario Machlik.**
- b) La estraro akceptis, ke Marianne povu sendi al Douglas provizorajn estrarkunvenajn protokolojn jam antaŭ ilia aprobiĝo, por informo kaj lingva korektado. La protokolo estu konsiderata aprobita post unusemajna tralegado kaj eventuala korektado de la estraranoj en Dropbox.
- c) La modemo en la oficejo ne plu funkcias. Ni decidis, ke se Herman ne baldaŭ venos al Oslo, ni voku ripariston de Telia, eĉ se tio kostos iom da mono.

15) Venonta estrara interkonsiliĝo

La venonta estrara interkonsiliĝo okazos ĵaŭdon la 13-an de januaro je 20.00 per Zoom.

Protokolis Marianne Lund